



Jarkolekto : 2010

Numero : 1

Paĝo : 1

La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

*Senlime*Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**

H. Lentzen

Feldweg 20

BE-4701 KETTENIS

Tel. xx-32-(0)87-55.43.26

E-mail : lentzen@senlime.org**Editeur responsable****Responsa eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: jacques@senlime.org

J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters

Esperantista Grupo de Verviers

BE-4800 VERVIERS

Informatie in het Nederlands**Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: parren@senlime.org

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16

NL-6285 AM EPEN

Informationen auf deutsch**Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@senlime.org

K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43

DE-52134 HERZOGENRATH

Aperas kvarfoje en jaro kaj**rete elŝuteblas ĉe****www.senlime.org****Prezroj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ
januare, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.La kotizo (10 € - denove deviga)
estas disigita de la abono al la
papera versio de nia informilo (12€).

KOTIZOJ – COTISATIONS

Lors de la dernière assemblée générale de *Senlime*/Groupe espérantiste de Verviers, il a été décidé de rétablir, pour les membres effectifs et adhérents de *Senlime*, une cotisation annuelle de 10 EUR (ni plus ni moins que le montant antérieur, mais distincte de l'abonnement à ce bulletin). En effet, la gratuité n'existe pas, même sur internet, où l'abonnement à un fournisseur d'accès et/ou d'hébergement sont soit payants, soit financés par une publicité indésirable (il y a quelques années, nous avons «déménagé» le site du groupe espérantiste de Verviers, hébergé «gratuitement» à l'époque parce que des publicités à caractère pédophile y avaient été placées par le fournisseur)! N'oubliez pas, par ailleurs, que la condition statutaire essentielle pour être reconnu membre de *Senlime* est de collaborer d'une manière ou d'une autre (le cas échéant : financièrement) à son fonctionnement.

Nous savons que nous pouvons compter sur vous.**Merci pour votre collaboration.****Bonne année 2010 au sein de notre association !**

Dum la lasta ĝenerala asembleo de *Senlime*/Esperantista Grupo Verviersa, estis decidite restarigi, por la efektiva kaj anighintaj membroj de *Senlime*, jaran kotizon da 10 EUR (nek pli nek malpli ol la antaŭa sumo, sed distingenda de la abono al ĉi-tiu informilo). Efektive, senkosteco ne ekzistas, eĉ sur la reto, kie abono al alir- aŭ loĝ-liveranto estas pagendaj, aŭ financitaj per reklamoj nedeziritaj (antaŭ kelkaj jaroj, ni devis translokigi la tt-ejon de la esperantista grupo Verviersa, tiam senpage loĝigita, ĉar la loĝ-liverinto aldonis infanseksemecajn reklamojn)! Ne forgesu, aliflanke, ke la esenca kondiĉo statuta por esti membro de *Senlime* estas kunlabori iumaniere (eventuale, finance) al ĝia funkciado.

Ni scias ke ni povas kalkuli pri vi.**Dankon pro via kunlaborado.****Bonan jaron 2010 sine de nia asocio !**Pour le comité, le premier secrétaire,
Por la komitato, la unua sekretario,
Jean-Marie **Jacques**



Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

Bosonoj kaj nodoj

Jam en la jaro 1924, la barata fizikisto **Bose** (1894-1974) el Kalkuto, faris unu el la plej gravaj kontribuoj al moderna fiziko: kiel unua li derivis la leĝon pri lum-radiado de Max **Planck** el la fundamenta koncepto, ke sam-specaj partikloj estas nedistingeblaj. Pro tio, unu el la du klasoj de partikloj nun nomiĝas laŭ li: **bosonoj** (la alia klaso estas la *fermionoj*).

Einstein tuj akceptis la laboron de **Bose** kaj aplikis ĝin ne nur al lumo, sed ankaŭ al materio, al atomoj. Li konkludis, ke sub certaj kondiĉoj, parto de iu gaso kondensiĝu en novan staton de materio (apud la gasa, flua kaj solida). Tiun staton oni nomas hodiaŭ Bose-Einstein-kondens-aĵo, kaj ĝi karakteriziĝas per tio, ke ĉiuj ĝiaj atomoj estas nedistingeblaj en la sama stato.

La "Ŝnuraj teorio", kiu celis rekunigi la relativan fizikon de **Einstein** kaj la kvantuma fiziko, ofte estas nomita "Graalo de la fizikistoj".

Post 1990, laboroj de la Usona **Witten** kondukis al difino de spaco kun 11 dimensioj (3 spacaj, 1 tempa, kaj 7 aliaj... kiujn ni ne sensas).

Tiu teorio unuecigas ne nur la relativecon de **Einstein** kaj la kvantuma fiziko sed ankaŭ la antaŭa "ŝnura teorio"...

03-19 19h30 BE-Kelmis, Sélect:
"Vidpunkto pri Bosono, ŝnuraj teorioj kaj aliaĵoj" (far' Karlo Norga).
Inf. norga@senlime.org

Santorini

Dum vulkana erupto (1600 antaŭ J.K.), la insulo **Kaliste** [Belega], situanta en la sudo de la **Egea** maro, 75 km for de la kontinento, estas komplete detruita kaj naskas tri insulojn: **Thera**, **Thirasia** kaj **Aspronisi**.

La nomo **Santorini** [Sankta Irena] estas donita de la Venecianoj dum la 13a jarcento. Post la anekso de la insularo al Greklando en 1840, tiu-ĉi oficiale retrovas sian antikvan nomon: Thera.

Santorino aspektas kiel krescento kies alteco kreskas de la orienta marbordo ghis la centra «kaldera» (kaldrono) La vilaghoj situantaj sur la klifo (**Fira**, **Oia**), disponas pri haveneto en la kaldera alirebla tra vojeto per azenoj (eta telfero en **Fira**).

Nur la haveno **Athinios**, kie ĝenerale alvenas la vizitantoj, akceptas veturilojn. Aerhaveno akceptas etajn aviadilojn

Pro la malriĉeco de la tero, kovrita da cindroj kaj pumikoj, nur unu specifa vinkulturo eblas: la **asirtiko**, je tre eta rendimento.

En 1970 estas malkovritaj en **Akrotiri**, sub la vulkanaj cindroj kaj pumikoj, belegaj freskoj kaj ceramikaĵoj, postrestaĵoj de antikva civilizacio (minoja) el la dua jarmilo antaŭ J.K..

04-16 19h30 BE-Kelmis, Sélect:
"Santorini, la Kiklada perlo", prezentota de Jean-Marie Jacques.
Inf. jacques@senlime.org

Hunoj en Vaals

La **Hunoj** estas Aziaj triboj, kiuj invadis Eŭropon dum la 4a kaj 5a jarcentoj. Ilia deinfana lerteco en rajdado, kaj la uzo de mallonga pafarko estis avantaĝo por ili dum multaj bataloj.

La **Hunoj** estas priskribitaj de la **Romianoj** kaj **Gothoj** kiel brunaj mongoloj sen barbo. Laŭ niaj nunaj konoj, 20 ĝis 25% de la **Hunoj** retrovitaj en la tomboj estis mongolaj, la plimulto estis eŭropeca.

La **Hunoj** disvastigis la kranian misformadon, precipe ĉe la virinoj.

La **huna** lingvo, neniam skribita, estas malbone konata. Tekstoj de la **Grekoj** kaj **Romianoj** atestas pri turka lingvo (ligita al bulgara kaj mongola).

La **Hunoj** estis bredistoj kaj lakto-produktantoj. Ĉaso samtempe estis ilia preparado al milito. La brutaro donis al ili ledaĵojn, lanaĵojn kaj ostaĵojn.

La arkeologio atestas pri la alveno kaj la progreso de la **Hunoj** de la Centraziaj stepoj ĝis la nuna Germanio (kie ili ŝajne kontribuis al la komenca disvastiĝo de Akvisgrano) kaj de la Danubo ĝis la Balta maro.

Gravaj hunaj postrestaĵoj estas malkovritaj plurloke, eĉ en Vaals, apud Akvisgrano... kaj **Amikejo** !

05-21 19h30 BE-Kelmis, Sélect:
"Hunoj en Vaals", prelego de nia historiisto, Mathieu Schrymecker.

ESPERANTO

Eŭregiona kalendaro 2010 (1/2)



Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutlicherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

Pro la riskoj de vintra veteraĉo, ni ne kunvenos en januaro.



02-19 19h30 BE-Kelmis,
Sélect: **ĝeneralaj asembleoj**
(de *Senlime* kaj E.G.V.) kaj
labor-kunveno.

03-19 19h30 BE-Kelmis,
Sélect: "**Vidpunkto pri**
Bosono, ŝnuraj teorioj kaj
aliaĵoj" (far' Karlo **Norga**).
Inf. norga@senlime.org

04-16 19h30 BE-Kelmis,
Sélect : "**Santorini, la**
Kiklada perlo", prezentota de
Jean-Marie **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

05-21 19h30 BE-Kelmis,
"**Hunoj en Vaals**", prelego de
Mathieu **Schrymecker**.

06-18 19h30 BE-Kelmis,
Karaokeo.



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis,
Select, okazos la: **09-17, 10-**
15 kaj 11-19.
Zamenhof-festo la 12-19 (?).

Vu les risques d'intempéries hivernales, nous ne nous réunirons pas en janvier.



19-02 19h30 BE-Kelmis,
Sélect: **assemblée générale**
(de *Senlime* et E.G.V.) et
réunion de travail.

19-03 19h30 BE-Kelmis,
Sélect: "**Point de vue sur les**
Bosons, les théories des
noeuds etc." (Charles **Norga**).
Inf. norga@senlime.org

16-04 19h30 BE-Kelmis,
Sélect : "**Santorin, la Perle**
des Cyclades", présentée par
Jean-Marie **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

21-05 19h30 BE-Kelmis, "**Des**
Huns à Vaals": conférence de
Mathieu **Schrymecker**.

18-06 19h30 BE-Kelmis,
Karaokeo.



Réunions suivantes au Sélect,
La Calamine (BE), les: **17-09,**
15-10 et 19-11.
Zamenhof-festo le 19-12 (?).

Novaĵoj pri **AMIKEJ** kaj EMRo.

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

Liège-Verviers-Aachen minacita

La internacian fervojan linion Liegho-Vervierso-Akeno servas 3000 volta memmovighanta vagonaro kiu ne plus estos akceptita en la stacidomo de Akeno komence de 2011. La Belga Fervoja Societo ne publikigis sian solvon...

La estro de la privata transport-societo Akena sugestas dividi la trajnojn el Ostendo en la stacidomo Welkenraedt, kun vagonaro al Eupen kaj alia al Akeno (tra Hergenrath/Kelmis). Teknike ne eblas per unusola lokomotivo, sed la Belga Fervoja Societo ĵus mendis malpezajn memmovighantajn vagonojn, kiujn oni facile povas kupli aŭ malkupli. Tiel oni solvus la problemon de la linio kaj savus la novan haltejon de Hergenrath financitan de Eŭropo kun la beno de la Akena "Euregiobahn".

Translima buslinio 50-jara

La 15an de decembro 1959 ekfunkciis la unua translima buslinio inter Kelmis kaj Akeno. Eŭregiona premiero!

Tiu iniciato estis vera evento por loghantaro de la du urboj, tuj post kvin jaroj da milito, kaj la malapero de la iama tramlinio. Tiuepoke, la vojaghantoj luprenis sidlokon en germana buso ghis la landlimo, kiujn ili piede preterpasis en Tulje, antaŭ ol grimpi en buson belgan. Ili pagis per siaj respektivaj moneroj!

Nuntempe, la du societoj trairas la tutan linion inter Kelmis kaj Akeno ghis la freshdata plilongigo al Laurensberg. Depost 1979, Kelmis estas parto de la tarifzono Akena kaj nura ir-kupono kostas 2,30 €.

Shtono por la «Vojo de l'landlimoj»

Bone rearanghita, la ejo de la "Tri landlimoj" (BE-NL-DE) kaj la turisma "vojo de l'landlimoj" kiu - post 37 km en Belgio - transpasas ghin, disponas pri nova trilingva signalaro. Sola centre de cirklo 10 metrojn diametra, la fama limshtono trilanda (fakte kvarlanda se kalkuli ankaŭ pri Neŭtrala Moresneto) nun disponas pri trilingva klarig-panelo... kaj 20 pliaj panelojestas diversloke instalitaj. Interesa broŝuro klariganta la vojdirektojn disponeblas en la muzeo Kelmisa (2 €).

La muzeo modernigota

La Muzeo pri Gueul-valo, rue Max, en Neu Moresnet (Kelmis), festas siajn 25 jarojn da ekzisto kaj proponas ghis la 31a de januaro 2010 retrovidigan ekspozicion pri tiu aventuro. Poste, ghi estos komplete plibonigita de muzeistoj.

Post plurmonata rekonstruado - jam delonge atendita kaj plurfoje anoncita - far' Akena entrepreno, ghi redonos al tiu nekutima rakonto aspekton malpli "polvo-plenan". La ghenerala prezento estos komplete modifita kaj

novaj dokumentoj aperos por plirichigi la enhavon de muzeo nekutima por nekutima historio kiu transpasas la limojn de la regiono. Estos interalie pli bone emfazigita la aparta epizodo pri la esperantista utopio. Plia okazo por rememorigi ke Dr Molly, chef-kuracisto de la societo "Vieille Montagne" kiu ekspluatis la kalaminan minon, volis fari el la neŭtrala teritorio de Moresnet esperantistan shtaton sub la nomo «*Amikejo*», notinda anekdoto.

La germanlingva Komunumo financos 60 % de la laboro. La suma elspezo atingos proksimume 450 000 €.

E-adreso: museum@kelmis.be

Muziko de Amikejo

En 1908, Willy Huppermans komponis, speciale por la proklamo de la libera Esperanto-shtato *Amikejo*, la Amikejo-marŝon. Ghi estis ludita de la tiuepoka muzik-societo de la "Vieille Montagne".

La nuna "Muzika Rondo Kelmisa" plu ludas ghin okaze de festoj, karnavalo, k.t.p. sed jam ne surdiskigis ghin.

Tamen la ŝatantoj de karusela orgeno povas trovi ghin sur KD "Blome's Karussell-Organ" (79er Richter Konzertorgan) CD 3009 GEMA havebla che:

MUSICPRODUKTION
Wilfried Hömmerich
D-53027 Bonn
Postfach 170103.

Bonan aŭskultadon!

VERVIERSA BARKAROL

esperanto-adapto de *Senlime*

Se vi jam vizitis Vervierson, vi certe rimarkis kariljonojn kiu senlace ripetas saman melodion... Se ne, vidu nian ttt-ejon kaj tuj alvenu ĉe ni !

La «Barcarolle Verviétoise» de Corneille Gomzé, datiĝanta el la 19a jarcento, apartenas al la (valona) folkloro Verviersa.

Se vi volas kanti tiun kanzonon kun ni en esperanto, venu dum nia karaoke-vespero aŭ dum nia Zamenhof-festo (Jean-Marie Jacques estas kreinta «krudecan» version de la melodio dank'al sia sintezilo).

En nia n-ro 2009-1, ni alvokis vin al kunlaboro por traduki ĝin en esperanton. Hodiaŭ estas farite kaj jen la rezulto. Dankon.

Kompreneble ne temas nur pri traduko sed pri vera adapto ĉar la originala kanto jam maljuniĝis kaj ne celis esperantistojn. Oni do forigis unu troan strofon, modifetis aliajn (interalie aldonante mencion pri Amikejo...) kaj kompanse antaŭvidis ripozigan silenton (instrumentan strofon) meze de la kanto.

Tiel aranĝita, tiu kanto ŝajne taŭgas por komuna kantado ĉe esperanto-festoj kaj eĉ povus, se utile, fariĝi la «oficiala himno» de la esperantista grupo de Verviers (sed ĉu vere necesas ?).

Verviersa barkarolo

- verkis Corneille **GOMZE**
- esperantigis **Senlime**

+ **INSTRUMENTA** rekantaĵo
(*enkonduke*)

Laŭ ar/i' de ni kant/at/a
dum la manĝ/o ĉi/u/tag/a,
Ni prov/is, am/i/ko bon/a,
re/kant/aĵ/on al/met/i:

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.

Nen/i/on en la kap/et/oj
hav/as ni, krom la "plok/et/oj",
sed el fel/oj de ŝaf/et/oj
kion ajn fa/brik/as ni!

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.

Mal/graŭ bru/oj de l'fa/brik/o,
kas/tel/o de l'me/ka/nik/o,
Aŭs/kult/u! Jen bel' muzik/o!
Nun Vi/temp' lud/as por ni!

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.

Ni la kap/on rajt/as lev/i:
li/ber/ec/on ĉas/is il/i...
Ant/aŭ la mar/tir/o Ŝa/pui,
sur la plac', ge/nu-iĝ/u ni!

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.

+ **INSTRUMENTA** strofo
(*ripoze*)

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.

Ni mal/aŭd/u klaĉ/em/ul/ojn,
ti/ujn aĉ/ajn men/sog/ul/ojn,
pri la flag' de l'plur/lingv/ul/oj:
ja tre bon/e taŭg/as ĝi!

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.

Nun prok/sim/e, Am/ik/ej/o
por ni iĝ/is kun/ven/ej/o,
de "Sen/lim/e" la prov/ej/o:
es/per/ant/on fleg/u ni!

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.



La «Verviersa barkarolo» kompreneble haveblas ĉe **Senlime** sub la komputila formo de karaoke-dosiero.

Verviersa **A**ngulo

Verviersa **E**speranto **G**ruppo

Rapport annuel

(extraits)

Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour
l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

Cotisations

Les espérantistes et sympathisants
sont cordialement invités à soutenir
notre programme d'action en versant
dès aujourd'hui l'une des cotisations
suivantes au compte

n°: **000-0245571-64**

IBAN: BE29 0000 2455 7164

BIC: BPOTBEB1

(Banque de la Poste)

de:

Esperanto grupo

25 Rue Pierre Fluche

BE4800 VERVIERS

*La cotisation de **Senlime** est de
nouveau obligatoire et fixée à 10
EUR (l'abonnement à ce bulletin en
version «papier» s'élève à 12 € en
raison de l'augmentation des coûts).*

D'avance, merci à tous !

A.P.E. 2009 (EGV) 14 €

U.E.A. 2010 (MA) 60 €

Senlime (cotisation 2010) **10 €**

**en indiquant le nom du membre
cotisant, le bénéficiaire, l'année
«cotisation de pour».**

Juillet 2008 : 93^e Congrès Universel à Rotterdam

Le Congrès de l'Association
Universelle d'Espéranto (UEA)
reste l'événement annuel le plus
marquant. [...] outre la **motivation**
extraordinaire qu'il apporte (il faut
avoir vu une fois dans sa vie
2000 personnes de 70
nationalités et langues différentes
se parler et se comprendre sans
interprète...), il permet
d'enseigner l'espéranto à tous
les niveaux [...].

Juillet 2008 : journée d'étude en l'honneur du 100^e anniversaire d'Amikejo (Bruxelles)

Le 26 juillet, à l'hôtel du Congrès,
se sont réunis exceptionnel-
lement des membres de **Senlime**
et des hauts responsables de la
«Esperanta Civito» [Cité
espérantienne], mouvement
international dont les membres
estiment que les espérantistes
peuvent se considérer comme
citoyens d'un peuple sans état
(territoire). Cette réunion,
principalement animée par le
Prof. Silfer (université de
Bologne), a donné lieu (sur place
et par la suite) à diverses
réflexions - dépassant le cadre
strict de la linguistique - sur les
droits et devoirs découlant de la
citoyenneté, la réforme
nécessaire de l'ONU (afin, entre
autres, de garantir les droits des
peuples sans territoire), etc.

Décembre 2008: Maintenance de nos sites "Web"

Nous avons comme chaque
année profité de la période des
fêtes pour effectuer les
«retouches» nécessaires à nos

nombreuses pages web [...].
Nous pensons que l'avenir des
cours d'espéranto se trouve dans
des initiations rapides comme
celles présentées sur internet
(éventuellement week-ends ou
semaines de stage, pour lesquels
nous prévoyons également du
matériel d'animation de soirées :
ici prennent place **le sous-titrage
de films** et les **karaokés de
Senlime**). [...]

23 mai 2009 : Trilanda Renkontiĝo à Bonn

Nous ne pouvons passer ici sous
silence nos traditionnelles
"Trilanda"s (rencontres des
espérantistes des 3 pays: BE -
DE - NL) : vu l'intérêt (culturel et
pédagogique) pour nos membres,
nous avons organisé cette année
une rencontre à Bonn, avec la
collaboration des espérantistes
de la région, à l'occasion du 60^e
anniversaire de la **Loi
fondamentale de la République
Fédérale**, qui nous a valu un
supplément de «visibilité» sur des
sites habituellement fermés au
public mais très fréquentés à
cette occasion (le film de la
journée est placé sur **YouTube**).

19 juin 2009 : karaoké de Senlime en espéranto

Cette activité clôture désormais
traditionnellement chaque saison,
vu sa haute valeur pédagogique :
nous ne sommes pas de simples
«consommateurs» mais avons
également traduit/adapté
quelques chansons françaises et
préparons un cours centré sur le
karaoké.

J-M. Jacques.